

& Haraldal balado:

< Rekante 19 el 33 batoj por strofo, entute 825 paŝoj dum 10 minutoj. Sur bazo de artikolo de Jens Stengaard Larsen (http://www.liberafolio.org/Members/jens_s_larsen/kiu-efektive-estis-blinkenberg) verkis Martin Strid (2016) laŭ melodio kaj rekantaĵo de feroa Foka balado (Kópakvæðið). Klarigojn vidu post la strofoj.>

(# Melodio:

#Kópakvæðið: <:33> (/SoSo SoFa MiRe SoSo; do dore dodo; TiLa LaLa LaLaLa TiLa; LaSo SoLa SoSo;

(#Rekantaĵe: FaMi ReMi Fa So; dodo dore dodo; TiLa LaLaLa LaLa TiLa;La LaSo SoLa SoSo; FaMi ReMi Fa So o)

)×25)+

(& Strofoj:

'1 /En popola altlernejo ; Harald* instruas, ; Junularan Federacion ; klere kontribuas.

(×:; **Bonas jen por danci ; Nova estas dom'**, ; **traboj estas el fer' faritaj**, ; **tegmento plumba krome. ; Bonas jen por danci.**)

'2 Diras Harald al Andreo*: ; "Lingva profesor"! ; Pri vortaro mi havas ideon ; sed estas amator'."

'3 Harald estas pacifisto, ; senperforton kredas. ; En lernejoj por rezisto* ; li prelege pledas.

'4 Registaro de la danoj ; postulas pli da justo. ; Kunlaboro kun germanoj ; kolapsas en aŭgusto*.

'5 Ekas ĝenerala striko, ; tutalande estas. ; Okupantoj kun svastiko ; danojn ostaĝe arestas.

'6 Kaptas ili en Orhus-urbo* ; dek unu korifeojn, ; inter ili Verdaburgan* ; Haraldon kaj Andreon.

'7 Harald kaj eminentuloj ; estos mortviktimoj, ; sed nazioj miskalkulis ; Ĉe Harald mankas timo.

'8 Harald en malliberej' ; anstataŭ nenifar' ; povas per libroj el la hejm' ; labori pri vortar'.

'9 Vidas Andreo ĵaluza ; kiel diletanto ; Harald sian tempon uzas ; por lingvo Esperanto*.

'10 Liberigis Andreon ili ; en la deka tago. ; Dudek tagojn Harald trankvilis ; en sia verka ago.

'11 "Harald, iru el karcero, ; vin armeo gracias!" ; "Sed restontojn ĉu danĝero ; ĉi tie ne minacas?"

'12 "Se vi ne iros en liberon ; kiel ni vin petis, ; vin perforte el karcero ; devos ni forĵeti!"

'13 Harald do reiris hejmen ; "Kara mia edzin', ; karaj filoj, mi envejne ; ĝojas vidi vin!"

'14 Vintre telefonas Andre' ; "Ĉu vi radjon aŭdis? ; Redaktisto nazia* tre ; akre vin malaplaŭdis.

'15 Inter partioj demokratiaj ; en via parolad* ; mankis tiu de nazioj ; diras la "kamarad".

'16 Dormu bone, mi esperas ; ke mi vin revidos, ; kaj atentu, nun danĝeras!" ; "Ĉu? Sed mi ne timidos."

'17 Tuj de Harald la amikoj ; pro ĉi nova minaco ; estis tute en paniko ; kaj agis per sagaco.

'18 Ili Haraldon igis fuĝi ; trans maron al Sveduj', ; poste lia domo ruĝis, ; pro eksplodo* tuj.

'19 Kun la familio "sub grundo"* ; Harald konaton ; rerenkontis trans la Sundo* ; – profesoron Blatt*.

'20 "Blatt, saluton, kun Andreo ; antaŭ la milito ; pri faŝismo vi ideon ; havis*, ĉu, sen spito?"

'21 Andreo pri la lingvo franca ; estas ege sperta. ; Li vortaron tre nuancan ; verkas majstre lerta.

'22 Harald lasis ĉe li spuron ; pro sia metodo: ; Por Andreo la kulturo ; devas esti klopodo.

'23 "Vidis mi viron sen hezito ; tajpi sian vortaron ; esperantan dum milito ; sen kulturaj baroj.

'24 Sed ne povas tiom facila ; esti lingva vojo ; dum suferas mi humila ; laboris li kun ĝojo."

'25 Dek jarojn post la fuĝa dramo ; en Montevideo ; kontraŭ Esperanto malamon ; montris Andreo*.)

<& Klarigoj(*) al Haralda balado:

'1 Harald Grønberg (1899-1984), danespo kaj instruisto.

'2 Andreas Blinkenberg (1893-1982), profesoro pri franca lingvo kaj romanistiko en universitato de Århus 1934-1963.

'3 Kontraŭ germanoj naziaj kiuj dum 1940-1945 Danujon okupis.

'4 En la jaro 1943.

'6 Dane Aarhus aŭ Århus ; "Grøn borg" signifas "verdano burgo".

'9 Harald publikigis danan-esperantan vortaron en 1949.

'14 Helge Bangsted (1898-1974), ĵurnalisto, estro de la dana nazia partio 1942-1945.

'15 En urbo Skive.

'18 Nazioj eksplodigis ĝin.

'19 Sub grundo: kaŝiganta ; Sundo: la markolo inter Selando en Danujo kaj Skanujo en Svedujo ; Franz Blatt (1903-1979), profesoro pri klasika filologio ek de 1934, estis unu el la dek unu arestitaj ostaĝoj en Århus.

'20 En 1932 la universitata eldonejo de Århus eldonis libreton kun la titolo: "La faŝismo: tri prelegoj pri la nova Italio". Du el la prelegantoj estis Blinkenberg kaj Blatt.

'25 En Argentino en 1954 Unesko-konferenco akceptis rezolucion pri Esperanto malgraŭ malestima kontraŭparolo de Andreas Blinkenberg, tiama delegito de Danujo.>